

# La Verda Stelo

**ESPERANTO  
NEDERLAND**



**SEKCIO GRONINGEN-DRENTE  
&  
FRISA ESPERANTISTA RONDO**

majo 2012



## LA VERDA STELO

eldono de

### ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

#### ESPERANTO-KLUBO GRONINGEN-DRENTE

##### prezidanto

s-ro J.B. Swenker  
T.W.S. Mansholtstraat 25  
9728 MC Groningen  
tel. +3150 527 45 72  
retadreso:  
johan.swenker@xs4all.nl

##### sekretario

s-ino N.R. Kiel-Klunder  
G. Sterringastraat 60  
9728 VV Groningen  
tel. +31505251436  
retadreso: nrkielklunder@hotmail.com

##### kasisto

s-ro L. Staghouver  
Julianalaan 25  
9781 ED Bedum  
tel. +3150 301 40 15  
retadreso: luitstaghouver@home.nl

#### FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman  
Westerein 14 a  
8571 GB Harich (Frl)  
tel. +3151 460 22 72  
retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

##### ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

##### kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1  
ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas  
de la 19h45 ĝis la 21h45

##### Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25  
9728 MC Groningen  
J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

##### redakcio

J.B. Swenker, N.R. Kiel-Klunder  
retadreso: nrkielklunder@hotmail.com



## Enhavo

- |    |                                      |
|----|--------------------------------------|
| 2  | Enhavo                               |
| 3  | Klubkunvenoj                         |
| 4  | Naskiĝtagoj                          |
| 5  | Pri la nordo                         |
| 10 | Esperanto-grupo Subvisurgo: ekskurso |
| 11 | Surprizo                             |
| 12 | Juna entuziasmulo                    |
| 12 | Forpasoj                             |
| 13 | Google translate                     |
| 15 | Invito 26 majo 2012                  |

### Contributie Esperanto Noord-Nederland 2012

<b>Afdelingslid</b> (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 12,50
<b>Gezinslid</b>	€ 6,25
<b>Donateur</b> (minimaal)	€ 7,00
Abonnement LA VERDA STELO	€ 7,00
Over te maken op ING banknr. <b>3822472</b> t.n.v. <b>ESPERANTO NOORD-NEDERLAND</b> te Bedum	

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van **ESPERANTO NEDERLAND**. Vandaar dat wij hier ook het rekeningnummer ervan vermelden: **78 68 44 167** (TRIODOS-Bank), t.n.v. Esperanto Nederland te Monnikendam

<b>Lidmaatschap</b> (incl. abonnement Fen-X)	€ 30,00
<b>Gezinslid</b>	€ 10,00

# Klubkunvenoj

- |    |           |       |                                    |
|----|-----------|-------|------------------------------------|
| 26 | majo      | 13.30 | Woudagemaal + kradrostado (pĝ. 15) |
| 14 | junio     | 10.00 | Schimmelpenninckhuys               |
| 12 | julio     | 10.00 | Scandinavisch Dorp                 |
| 16 | aŭgusto   | 11.00 | lunĉo apud Dreesflat               |
| 6  | septembro | 19.45 | Dreesflat - pri la ferioj          |

Aliaj klubkunvenoj: 20/9, 4/10, 18/10, 1/11, 15/11, 29/11

- |    |          |       |                |
|----|----------|-------|----------------|
| 13 | decembro | 19.45 | Zamenhof-festo |
|----|----------|-------|----------------|

- ŝanĝoj rezervitaj -

la plej freŝajn novaĵojn kaj  
ŝanĝojn vi trovos en nia  
retejo sub la rubriko

**Aktuale**

<http://pingveno.nl/klubo>

## Aliaj kunvenoj

- |   |           |  |
|---|-----------|--|
| 9 | junio     | jarkunveno Esperanto Nederland (vidu Fen-x)              |
| 1 | septembro | ekskurso Esperanto-grupo <i>Subvisurgo</i> (vidu pĝ .10) |

# Naskiĝtagoj

5 majo	Gonda	Kruijer
7 majo	Gerard	Boer
11 majo	s-ino	Hennekam-Tijs
11 majo	Jaap	Laan, van der
23 majo	Frans	Schild
25 majo	Albert	Hoekstra
27 majo	Warner	Renken
1 junio	Adri	Oosterwijk-Dominicus
16 junio	Harm	Roeters
24 junio	s-ro	Snoek
10 aŭgusto	Nelly	Kiel
16 aŭgusto	Koos	Scharroo
30 aŭgusto	Johan	Swenker
3 septembro	Wiebren	Akkerman
5 septembro	Berendina	Brink
7 septembro	Marita	Kruijswijk
17 septembro	Henny	Hogen-Cornelissen, van



# Pri la nordo

Festvespero

La **15-an de decembro 2012** ni festis la naskiĝdatrevenon de la kreinto de Esperanto, d-ro L.L. Zamenhof, kiu naskiĝis je tiu dato en la jaro 1859. Ĉeestis 13 personoj, inter ili s-ro Gerrit Berveling, la prezidanto de *Esperanto Nederland* kaj s-ino Hiemstra, unu el niaj abonantoj. Ĉiu, kiu alvenis, metis sur la tablon iun hejme preparitan manĝaĵon. Wiebren regalis nin ĉe la kafotrinkado per migdalstangeto. Luit prizorgis

poste la supon kiel kutime.

Kiam Johan estis bonveniginta la ĉeestantojn, Ineke Emmelkamp turnis sin al s-ino Hiemstra por gratuli ŝin pro ŝia 50-jara membreco de Esperanto Nederland. Ineke, estrarmembrino de Esperanto Nederland, enmanigis al ŝi florojn kaj Jubilean Gratuldokumenton en verda kadro, pro kio ŝi estis tre surprizita. La malvarma bufedo estis tre varia kaj tre bongusta. Je la fino Johan regalis nin per glaciaĵo. Post iom da purigado Wil invitis ĉiujn meti la seĝojn en formo de cirklo, ĉar si preparis ludon. Aŭdante muzikon,



oni devis rondirigi paketon. Kiam la muziko haltis, estis permesate forpreni la paperon. Tiam ni vidis paketeton, sur kiu legeblas al kiu oni donu ĝin. Povis esti al la plej alta persono, persono kun okulvitroj, persono kiu sidas kontraŭe aŭ al iu alia. Finfine estis Gerrit, kiu rajtis forpreni la lastan paperon kaj gajnis aŭteton, kiu povas polvosuĉi. Post tio Wil voĉlegis konkludon de iu el la pasinteco. Tiu persono opiniis, ke estas agrable, ke ne ĉiuj estas devigataj lerni Esperanton, ĉar tiam eble ne plu ekzistus tia amikeco inter esperantistoj kiel nun. La ceteraj partoprenantoj estis Nelly, kiu preparis la salonon kaj prizorgis la trinkaĵojn, kaj la tri nunaj kursanoj, *Anna, Richard* kaj *Björn*.

Raportis Wil.

**5 januaro 2012**

Okazis la unua kunveno de la nova jaro. Wil venas vintre per taksio al la klubo. La ŝoforo rimarkis la kukon, kiun Wil kunportis por ni pro sia naskiĝdatreveno. Fine de la vespero restis iom da kuko. Wil pensetis, ĉu mi donos ĝin al tiu afabla ŝoforo? Sed verŝajne reveturigos ŝin alia ŝoforo. Do la kukon ricevis Luit, kiu agis kiel ŝoforo por Ineke.

Ni diskutis pri budo dum kvintaga borso en Utreĥto. Ŝajnas al ni, ke tio estas tro granda, eĉ por Esperanto Nederland. Ni ja bezonus tro da esperantistoj, por nura ĉeesto.

La programo por la vespero estis *vivanta gazeto*. Ĉiam estas interese aŭdi kiujn erojn el la gazeto trovis la aliaj. Komence de la nuna jaro multe pluvis. Kompreneble tion ni legis en la gazeto. La akvonivelo en la kanaloj estis ege alta. Tiel alta, ke la Groningenan muzeon oni preskaŭ devus evakui.



Niveltubo apud Roderwolde indikas, ke la akvonivelo estis ege alta.

Johan naskiĝis en Heerlen. Por li la novaĵoj pri la butikaro 't Loon estis interesaj kaj gravaj. La firmao, kiu antaŭ 45 jaroj konstruis ĝin, konstruis ankaŭ alian gepatran domon. Parto de la butikaro malleviĝis. Pro la danĝera situacio oni malkonstruis tiun parton de la konstruaĵo. Ĉiu vidis en la televida ĵurnalo la akcidenton pro karbido. Dum la jarŝanĝo homoj brue forpelas la fantomojn. Pafi per karbido faras multe da bruoj, sed kaŭzas ankaŭ premo-ondojn. Tiu premo-ondo frakasis la fenestrojn de apuda biendomo.

Kaj fine mi mencias la bredadon de kaviaro. Fiŝbredejo en Eindhoven produktas nederlandan kaviaron. Oni povas aĉeti dekgraman skatolon kontraŭ nur dek eŭroj. Bonan apetiton.

**19 januaro 2012.**

Ĉeftemo de la vespero: *desegni per komputilo.*

Wil vizitis en Zwolle maljunan membrinon de nia klubo, *s-inon Heide*. Poste ŝi vizitis, kiel vera apostolo de Esperanto, ankaŭ *s-ron Stuiver*, kiu intencas lerni Esperanton per la reta kurso de Koos. Pli proksime de sia hejmo ŝi renkontis junan viron, kiu salutis ŝin nome de Harm Roeters.

Pasintan sabaton Johan kaj Nelly iris al Drachten por ĉeesti prezentadon de *Kapriol'!*, kiu prezentas balfolk-muzikon. La kantoj estis en la nederlanda lingvo. *Kapriol'!* kaj alia grupo prezentis alterne. La publiko estis diversaĝa.

Ineke ricevis retmesaĝon de virino, kiu ricevis insignon de *s-ro Ben Beekhuizen* (iama maristo, kiu multe veturis) kaj ŝi demandis, ĉu la insigno de Gresillon en iu ajn maniero rilatas Esperanton. Ineke povis respondi tiun demandon jese. Ŝi ankaŭ sendis mesaĝon pri la venonta studosemajnfino al grupo de studentoj en Emden.

La 10-an de februaro Ineke partoprenos kunvenon en la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam pri la katedro pri interlingvistiko kaj esperantologio ĉe la universitato de Amsterdam. Ĉeestos inter aliaj ankaŭ *s-ro Humphrey Tonkin*.

Luit raportis pri la aktuala situacio kaj progresoj de sia konga korespondamiko *Joseph* en Pollando.

Helpe de tekokomputilo Johan montris kiel li prilaboras la tekstojn kaj fotojn por nia informilo *La Verda Stelo*. Por ke bildoj ne postulu tro da komputila memorkapacito, li malgrandigas ilin per la senpage havebla programo *IrfanView*.

Se oni ekzemple en la programo *Word* malgrandigas bildon per ŝovado de la anguloj, oni ja malgrandigas la surfacon de la bildo sed ne la nombron de la bilderoj.

Johan montris ankaŭ kiumaniere oni povas

- korekti ruĝajn okulojn,
- rektigi (au malrektigi) bildojn,
- aldoni tekston al bildoj,
- kloni parton de bildoj.

Alia programo, kiun Johan uzas, estas la same senpage havebla *GIMP*. Tiun programon li uzas i.a. por la korektado de la bildperspektivo kaj por prilabori bildojn en tavoloj.

Protokolis Luit Staghouwer

## 2 februaro 2012

Kiel kutime ni komencis babili pri ĉiaj aferoj. En *LinkedIn*-grupo pri Esperanto nun estas diskuto pri la esperantaj literoj kun supersignoj. Esperantistoj ja ŝatas kvereli pri tio. Vi scias, ke Zamenhof skribis en la fundamento de Esperanto, ke oni povas anstataŭigi ĝ per *gh*. Sed en la interreta erao multaj homoj uzas la iksan sistemon. Vi povas trovi la fundamenton en Interreto laŭ

<http://www.akademio-de-esperanto.org/fundamento/index.html> . Interese estas, ke vi povas legi ĝin ankaŭ en la iksa sistemo.

La programo estis *gramatiko*. Luit estis diligenta: li sendis multajn demandojn al Wil por pritrakti. Luit estas leganta la libron *Fatalo* (Noodlot) verkita de *Louis Couperus*. La tradukita libro havas kelkajn nekutimajn frazojn. Wil demandis la

tradukinton Gerrit Berveling pri tiuj frazoj. Kompreneble, tamen la frazoj estis seneraraj. Tio estis la malfacila parto de la vespero. Poste Wil denove klarigis la uzadon de *-n* en Esperanto. Mi povas memori: neniam povas esti du rektaj objektoj en unu frazo. Do mi ne kuraĝas skribi: *lundon mi vizitas vin*. Sed tiu frazo tamen estas senerara Esperanta frazo. Kial? Ĉar *lundon* estas komplemento de tempo sen prepozicio (tempa adjekto). Vi certe ankaŭ lernis frazojn kiel: *la kato saltis sur la tablon*. En tiu frazo la *-n* indikas, ke la kato movis sin de unu loko al alia. Tuj poste vi lernis, ke *al* ĉiam indikas movon en iu direkto, kaj tial ne bezonas *-n* por tion indiki. Dum la ekspliko de Wil mi lernis, ke la verbo *meti* ĉiam indikas movon de unu loko al alia. Ĝi tial ĉiam bezonas *-n* por indiki tiun movon. Simpla lingvo, ĉu ne? Johan.

## 16 februaro 2012

Dum la kunveno de la 16-a de februaro okazis nia jarkunveno kun kelkaj oficialaj aferoj, kiel elekti novajn estraranojn. La triopo Johan, Luit kaj Nelly daŭre restos nia estraro. Richard Hofman kaj Björn Gerrits konsistigos la kaskontrolan komisionon.

Alia ero de la jarkunveno, kiun vi certe volas scii, estas ke la kotizo en 2013 restos sama kiel en 2012. Rigardu la kolofonon por la detaloj!

Dum la jarkunvenoj ni jam ofte parolis pri nia biblioteko. Ĉi-jare Ineke proponis, ke ni vizitu la studosemajnfinon en Schoonloo en marto. Estis bona ideo.

Pli oficiala raporto aperos antaŭ la sekva jarkunveno, sed la gravajn aferojn vi jam nun scias.

Krom paroli pri oficialaj aferoj ni ankaŭ simple babilis. Ni komencis revivigi aferojn de antaŭ longe. Ekzemple Wiebren surbendigis en 1971 la UK-on. Alia persono ŝatus fari la samon, sed bedaŭrinde lia mikrofono ne funkciis. Nutri du sonbendigojn per nur unu mikrofono Wiebren ne kuraĝis.



Alia persono, irante al la UK en Anglio, kunportis teon. Strange, mi kunportus teon el Anglio kiel memorigaĵon. Fine de la vespero Ineke montris broŝuron pri Esperanto de la *Centro por Monda Edukado* en Nijmegen (*Centrum voor Mondiaal Onderwijs*). La broŝuro estas verkita por mezlernejanoj. Ili povas uzi ĝin kiel fonton por prelego pri Esperanto. Wil diris, ke 12-jara knabo lernis Esperanton per ŝia interaga kurso.

### 1 marto 2012

Kunvena ĉeftemo: Superjaro

Johan: Esperanto estas la 64-a lingvo en la traduk servo de Google.

Ineke montras novan nederlandlingvan informilon pri Esperanto. Kompilis ĝin *s-ro Bemelmans*. Ineke opinias, ke estas

taŭga informilo precipe por junuloj kaj lernantoj.

Ĉar la interreta kurso de Wil estas interaga, ŝi ne plu havas kontakton kun la lernantoj.

Laŭ ekzemplo de Wil ankaŭ Ineke vizitis la hejmon de maljuna esperantistino. Ĉi tiu sinjorino estas membrino de Esperanto Nederland ekde 1938. Bedaŭrinde la 97-jara *s-ino Van der Molen-Burgers* ne estis hejme. Poste ŝi telefonis al Ineke kaj en bona Esperanto ŝi dankis pro la flordonaco kaj invitis Ineke al alia vizito, se ŝi denove estos proksime de ŝia hejmo.

Nelly ricevis poŝtkarton de Bets Dodebier.

Ineke forveturos la 5-an de aprilo por partopreni la 5-an Mez-Oriantan Kunvenon en Turkio.

En julio Wil forveturos al Svislando kaj ŝi esperas, ke ankoraŭ anoncos sin kunvojaĝantino.

Wil renkontis iaman membron de sia junulgrupo. Tiu persono (*Teo*) nun laboras en Meksiko kaj en la Martini-preĝejo li prelegis pri sia laboro. La ĉeflingvo en Meksiko estas la hispana, sed la meksikaj indiĝenoj parolas pli ol 70 diversajn lingvojn, kaj oni ne emas lerni fremdan lingvon.

Superjaro - Kelkaj pli-malpli interesaj sciindaĵoj pri superjaro:

Superjaro estas jaro, en kiu februaro havas 29 tagojn anstataŭ 28. Jaro estas superjaro, se ĝi precise divideblas per kvar, sed jaro dividebla per cent estas superjaro nur se ĝi divideblas per 400.

Ĝis antaŭ nur kelkaj jardekoj oni opiniis, ke ne decas, se virino petas de sia amato edziĝi kun ŝi, sed en la 29-a de februaro ŝi ja rajtis fari al li tian peton.



En kelkaj landoj oni okaze de superjaro bakas specialajn superkukojn.

En Nederlando ĉi tiun jaron 10.613 personoj povis festi sian naskiĝtagon en la 29-a de februaro, la tagon kiam ili naskiĝis antaŭ minimume kvar kaj maksimume 100 jaroj.

## Ĥaoso de kalendaroj

	Angla kalendaro de Septembro 1752		Rusa kalendaro de Februaro 1918
	Lu 18 25		Lu 18 25
	Ma 1 19 26		Ma 19 26
Nederlanda kalendaro de Decembro 1582	Me 2 20 27		Me 20 27
Lu 3 10 27	Ĵa 14 21 28		Ĵa 14 21 28
Ma 4 11 28	Ve 15 22 29		Ve 15 22
Me 5 12 29	Sa 16 23 30		Sa 16 23
Ĵa 6 13 30	Di 17 24		Di 17 24
Ve 7 14 31			
Sa 1 8 25			
Di 2 9 26			

Laŭ la reta ĵurnalo *De Speld* (kun satiraj novaĵoj) miloj da loĝantoj de *Loppersum* venis al sia laborejo tro malfrue pro la neatendita ekstra tago.

Ne en ĉiuj kalendaroj estas superjaroj. Islamanoj kaj judoj havas *lunkalendaron*. Pro tio la komenco de *ramadano* estas 11 tagojn pli frue ol en la antaŭa jaro, kaj en la juda kalendaro ĉiun trian jaron havas supermonaton (adar 2), por ke la festotagoj ne saltmoviĝu tro.

Wil "devigis" nin surpaperigi kiel eble plej multajn vortojn (nur substantivojn) de minimume tri literoj el la vorto *superjaro*, kaj ĉiujn (naŭ) literojn ni rajtis uzi nur unufoje.

Protokolis Luit Staghouver

*Ne forgesu ĝustigi viajn horloĝojn la 1-an de julio 2012. Aldoniĝos supersekundo en la nokto de la 30-a de junio.*

## 15 marto

La 15-an de marto ni ĉeestis nur kvinope: Johan, Luit, Nelly, Ineke kaj mi. La kaŭzo estis verŝajne la temo de la vespero, nome tradukado de la tre malfacilaj frazoj, kiujn *Rob Moerbeek* jen kaj jen elpensas kaj publikigas en Interreto. Antaŭ ol traduki ilin, ni preparolis la iradon de kelkaj el ni al *Schoonloo*, kie okazos la studosemajnfino en la venontaj tagoj. Ni intencas kunporti librojn el nia biblioteko por disdoni al tiuj, kiuj ŝatas ilin havi. Poste ni diskutis pri agado *Esperanto 125*. Ĝi devus komenciĝi la 23-an de marto per ĉiutaga leciono en Interreto dum 125 tagoj. Sed ĉu ĉiuj lecionoj jam estas preparitaj, ni ne scias. Tial estas nun malfacile varbi partoprenontojn per reklamanoncoj en gazetoj. Ineke montris al ni poŝtmarkon, kiun ŝi projektis pro la fakto, ke antaŭ 125 jaroj aperis la unua Esperanto-libro. La prezo por folieto de 10 markoj estos 8,95 eŭroj kaj por tri folietoj oni pagu 22,95 eŭrojn. Poste ĉiu el ni samtempe tradukis unu el la frazoj de Rob, kaj ni komparis niajn tradukojn kun liaj. Ne konate de ni estis, ke la traduko de *Georgië* estas *Kartvelio*. *Georgio* estas ŝtato en Usono. Ankaŭ la uzado de prepozicio antaŭ infinitivo ne estis bone konata de ni. Nur kvar prepozicioj estas uzataj prefikse, do povas aperi antaŭ infinitivo: *por, sen, krom, anstataŭ*. Entute ni tradukis ses frazojn el tasko 12 kaj unu el la nova tasko 13. En tiu frazo staras la vorto *pindakaas*. Tio ne estas *arakidfromaĝo*, sed: *arakidbutero*! Ĉu vi jam sciis tion? Kvaronon antaŭ la deka Johan fermis la kunvenon.

Wil.

**29 marto**

Ni kunvenis sepope.

Wil kaj Luit voĉlegis protokolojn.

Johan aĉetis du broŝurojn verkitajn de *Jan Bemelmans*. Estas bona propagandaĵo!

Sabaton Ineke, Johan kaj Wil vizitis la studsemajnfinojn en Schoonloo.

Johan kunportis kvar skatolojn plenigitajn per libroj por disdoni.

Restis du libroskatoloj.

Wil renkontis multajn ekskursanojn kaj amikojn.

Luit rakontis pri korespondaĵoj. Li rimarkis, ke eksterlandanoj kelkfoje ne vere havas la celon korespondi, sed financan peton.

La kradrostado en Frislando okazos la 26-an de majo.

Vi trovos la programon kaj aliajn datenojn aliloke en ĉi tiu *La Verda Stelo*.

La venontan kunvenon ni ludos.

La ĉi-vespera programo estas *plej ŝatata objekto*.

Ĉiuj kunportis kelkajn por rakonti pri ili, ekzemple Harm kunportis memfaritan lignan skulptaĵon, Björn montris vikingoŝipon al ni kaj ni rigardis glitbobenon de Luit.

Estis pli da objektoj kaj rakontoj.

Mi ŝatas aŭdi pri la plej ŝatataj objektoj de niaj klubanoj.

Nelly

Ni ricevis inviton de

**Esperanto-grupo Subvisurgo :**

Karaj,

Nia grupo faros la 1-an de septembro 2012 ekskurson kun membroj de Esperanto-grupoj *Noord-Nederland*, *Bremeno* kaj *Hamburgo*.

Ni renkontiĝos en *Bad Zwischenahn* verŝajne ekde la 11:30 horo ĉe la stacidomo.

Ni vizitos interalie la fiŝfumaĵejon *Fischerei Rabben*

Dreiberger Str. 37

26160 Bad Zwischenahn

([http://www.fischerei-rabben.de/index\\_2.html](http://www.fischerei-rabben.de/index_2.html))

Por veturado al kaj reen de la fiŝfumaĵejo ni verŝajne uzos aŭtobuson kaj/aŭ pramŝipon (kun promenado ĉ. 20-30 minuta - dufoje)

Ni ĝojas, se vi kaj viaj anoj povos partopreni.

Korajn salutojn,

Anne Höpken

Esperanto-grupo Subvisurgo

Schulstr. 13 a

26954 Nordenham

hoe\_an-4@ewetel.net

## Surprizo

Inter la kristnasko-bondeziroj, kiujn mi ricevis, estis koverto el Belgio de *Jen Verhagen*. Estis en ĝi letero kaj kupono de 7,50 eŭroj. Mi miris pri tio kaj unue supozis, ke mi eble sendis libron al ŝi, por kiu ŝi volis pagi al mi. Sed leginte la leteron, montriĝis, ke mi gajnis premion pro la traduko de poemo, kiu staris en klubgazeto el Nijmegen. Jen skribis: Via teksto estis plej fidela al la origina ŝercpoemo. Sekvas la poemo kaj mia traduko:



*"Kukeleku uu"  
kraait de haan.  
"Opstaan! Opstaan!  
Aan de leg gaan!!!  
Kukeluku-uu-uu."  
Och "Verhip",  
kakelt een kip.  
En in drift:  
"Ben je geschift?!"  
Loop naar de maan!  
Bazige haan -  
Ik pit nog.  
Ik zit nog  
op stok.  
Tok-e-tok... Tok."*

*"Kororiki ii"  
krias la virkok'  
"Leviĝu! Leviĝu!  
Demetu ovon ek!!!  
Kokoriki-ii-ii."  
Ho "Iru al diablo",  
klukas la kokin'.  
Kaj kolere:  
"Ĉu freneza estas vi?!"  
Iru al la luno!  
Ekstrema virkok'-  
Mi ankoraŭ dormas.  
Mi ankoraŭ  
sidstangiĝas.  
Tok-e-tok... Tok."*

***Wil van Ganswijk.***



Juna entuziasmulo!

La 10-an de februaro mi ricevis retmesaĝon de *Frank*, 12-jara knabo el la sudo de Nederlando. Li skribis al mi:

*"hoi, ik heb de lessen doorgewerkt en de woorden geoefend. na mijn berekening blijkt dat mijn gemiddelde 8,72 is. ik ben blij dat ik deze cursus heb gedaan omdat ik nu in de brugklas zit en een hoop nieuwe talen krijg, ik merk het effect echt. dank je dat u de link op uw homepage heeft gezet het heeft me echt geholpen."*

Mi estis tiel surprizita kaj ĝojigita, ke mi tuj reagis, petis lian nomon kaj adreson kaj sendis al li atestilon per Interreto kaj kvar libretojn per limakpoŝto. Venis reago:

*"dankon, hodiaŭ mi ricevis la leteron kaj la libroj. mi legas rapide, kaj mi scias multaj vortoj. kaj la vortoj mi ni scias staras en la libroj."*

*ik beleef veel plezier aan de boekjes, dank u wel dat u ze heeft gestuurd. ik kan ze goed gebruiken. doi."*

Kortuŝa reago de tiel juna knabo, ĉu ne? Mi intencas post iom da tempo denove kontakti lin.

Wil.

## Forpasoj

Hazarde ni aŭdis, ke forpasis antaŭ nelonge du el niaj konatoj.

Nevo de *s-ro H. van Dalen* el Odoorn malmembrigis sian onklon pro ties morto. Pro la granda distanco inter Odoorn kaj Groningen *s-ro van Dalen* fakte neniam ĉeestis klubvesperon, eble nur unu- aŭ dufoje. Li iam akompanis sian amikon *Ed Borsboom*, kiam tiu ĉeestis nian klubkunvenon por prelegi pri *Andreo Cseh*. Ankaŭ de Esperanto Nederland *s-ro van Dalen* estis membro.

En maljunaĝejo, kie mi volis viziti *s-inon Bertha Vink*, oni rakontis al mi, ke ŝi forpasis du semajnojn antaŭe. Ŝia plano estis transloĝiĝi al Venlo, kie loĝas filino de ŝi. *Bertha*, 87-jara, estis kursanino de *Wil* dum kelkaj jaroj. Kun amikino ŝi partoprenis KELI-kongreson en Finnlando, kien ili veturis per ŝia aŭto. Ŝi ne estis ano de nia groningena klubo, kvankam ŝi iam havis la intencon aniĝi. Ke ili ambaŭ ripozu en paco.

Wil.



# Google translate

Google ĵus ebligis aŭtomate traduki. La ĉi-suba teksto donas ideon pri tio, estas la anonco sur 'la Google traduki'.

## La angla teksto:

*Today, we are adding Esperanto to Google Translate, making it our 64th supported language.*

*Ludovic Lazarus Zamenhof started his quest for an easy-to-learn language shared by all people in the 1870s and first published the ideas in 1887 with his book Unua Libro. The concept of a common language spread quickly, and initial reactions to Esperanto have ranged from suppression to enthusiastic embrace. Now, 125 years later, Esperanto has hundreds of thousands of active speakers, millions of people with some knowledge of the language, and even a few hundred people who learned it from birth, taught by their parents.*

*Esperanto and Google Translate share the goal of helping people understand each other, this connection has been made even in this blog post. Therefore, we are very excited that we can now offer translation for this language as well.*

*The Google Translate team was actually surprised about the high quality of machine translation for Esperanto. As we know from many experiments, more training data (which in our case means more existing translations) tends to yield better translations. For Esperanto, the number of existing translations is*

*comparatively small. German or Spanish, for example, have more than 100 times the data; other languages on which we focus our research efforts have similar amounts of data as Esperanto but don't achieve comparable quality yet. Esperanto was constructed such that it is easy to learn for humans, and this seems to help automatic translation as well.*

*Although the system is still far from perfect, we hope that our latest addition helps you to learn more about Esperanto's history and culture. Translation to and from Esperanto will soon be available on [translate.google.com](https://translate.google.com), in our mobile web app, and in the Google Translate app for Android and iOS.*

Niet foutloos, maar toch ....

Hodiaŭ ni ofte aldonas Esperanto al Google Translate, farante niajn 64th subtenata lingvo.

Ludovic Lazarus Zamenhof komencis sian serĉon facile lernebla lingvo dividitaj de ĉiuj homoj en la jaroj 1870 kaj unue eldonita la ideoj en 1887 kun lialibro Unua Libro. La koncepto de komuna lingvo disvastiĝis rapide kaj komenca reagoj al esperanto esti gamis de forigo al entuziasma brakumo. Nun, 125 jarojn poste esperanto havas centojn da aktivaj parolantoj, milionoj de homoj kun ioma kono de la lingvo, kaj eĉ kelkaj cent homoj, kiujlernis ĝin denaske instruita de liaj gepatroj.

Esperanto kaj Google Translate dividi la celo de helpi homojn kompreni sin

reciproke tiu rilato estis faritaj ankaŭ en ĉi tiu blog. Sekve ni estas treekscitita, ke ni nun povas proponi traduko por tiu lingvo ankaŭ.

La Google Translate teamo estis vere surprizita pri la alta kvalito de maŝina tradukado por esperanto. Kiel ni scias el multaj eksperimentoj, plitrejnado datumoj (kiu en nia kazo signifas pli ekzistantaj tradukoj) inklinas liveri bonan tradukoj. Por esperanto, la nombro de ekzistantaj tradukoj estas kompare malgranda. Germana aŭ hispana ekzemple havi pli ol 100 fojojn la datumoj; aliaj lingvoj sur kiu ni enfokusigi nian esploron penadoj havas similajn kvantojn de datumoj kiel esperanto sed ne sukcesas komparebla kvalito ankoraŭ. Esperanto estis konstruita tiel ke ĝi estas facile lernebla por homoj kaj tio ŝajnas helpi aŭtomata tradukado tiel.

Kvankam la sistemo estas ankoraŭ tre for de perfekta ni esperas ke nia lasta krome helpas vin lerni pli pri esperanto historio kaj kulturo. Traduko de kaj al esperanto estos baldaŭ disponebla en [translate.google.com](http://translate.google.com), en nia retejo móvil apliko kaj en la Google Translate apliko por Android kaj iOS.

Sendis Johan

En Interreto ekzistas multaj retroŝtaj listoj. Ekzemple la listo por Esperanto-kursanoj de Wil. La retlisto *esperanto-anekdotoj@yahoo.com* ĉiutage sendas ŝercon al la abonantoj. Se vi ŝatas ŝercojn kiel ĉi-sube, vi povas aboni en la retejo de yahoogroups:

<http://groups.yahoo.com/group/esperanto-anekdotoj/>

#### TEKNIKA PROGRESO

*Jozefino:* Vidu kion mi trovis funde de tirkesto.

*Kruko:* Ĉu tio ne estas la vidkaseto de nia geedziĝo?

*Jozefino:* Jes, karulo. Ĉu vi volas spekti ĝin?

*Kruko:* Mi timas, ke ni ne povos.

*Jozefino:* Kial ne?

*Kruko:* Ĉar ni ne plu havas aparaton, kiu povas legi vidbendojn. Ĝi estas eksmoda teknologio!

*Jozefino:* Ĉu vere? Ĉu tio signifas, ke ni estas MALJUNAJ?

*Kruko:* Aŭ eble ni estas simple... bonŝancaj!

lom poste.

*Kruko:* Vidu, Jonjo -- jen nia vidbendo transformita al cifereca viddisko!

*Jozefino* ĝojas: Ĉu vere!? Kiel vi faris tion?

*Kruko:* Mi trovis specialan informadkan butikon, kie oni povas farigi tion.

*Jozefino:* Do, nun ni povos spekti ĝin, ĉu?

*Kruko:* Jes, karinjo. Almenaŭ tiom longe ke la CVD-a teknologio estos ankoraŭ uzebla.

*Jozefino:* Do, ni prefere faru rapide!

Rikardo



## Invito 26 majo 2012



La 26-an de majo ni vizitos la drenmaŝinon inĝ. D. F. Wouda.

Poste ni kradrostos ĉe Wiebren en Harich.

Ni renkontiĝos en la vizitejo de la drenmaŝino je la 13.30 h.

Gemaalweg 1a, 8531 PS Lemmer

La kotizo estas € 10,-

Aliĝi : sendu retmesaĝon al [nrkielklunder@hotmail.com](mailto:nrkielklunder@hotmail.com)

aŭ telefone : +31(0)505 251 436

**Bonvolu aliĝi antaŭ la 16-a de majo.**



La drenmaŝino inĝ. D.F. Wouda estas la plej granda ankoraŭ funkcianta vapordrenmaŝino en la mondo. La drenmaŝino situas ĉe *Tacozijl* (apud *Lemmer*) kaj estas uzata por malaltigi la akvonivelon en Frislando, kiam la drenmaŝino *J. L. Hoogland* ĉe *Stavoren* ne povas liveri sufiĉan kapaciton.

La drenmaŝino oni nomis laŭ inĝ. D.F. Wouda, ĉefinĝeniero de la provinca administracio de la akvovojoj, kiu kune kun inĝ. Dijkhoorn formplanis ĝin. La kvar tandem-kompundaj vapormaŝinoj kaj la ok centrifugaj pumpiloj estis konstruitaj de *N.V. Machinefabriek Jaffa* en *Utrecht*. La drenmaŝino estis inaŭgurita la 7-an de oktobro 1920 de reĝino *Vilhelmina*. Ekde 1998 la konstruaĵo estas sur la listo de Unesko kiel monda heredaĵo.

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND  
T.W.S. Mansholtstraat 25  
9728 MC GRONINGEN



*ESPERANTO – taal zonder grenzen*